# Raúl akceptis la prezidenton de Vjetnamio To Lam



**Foto: Studio Revolución**

Havano, sep 27  (RHK) La gvidanto de la Kuba Revolucio, generalo de la armeo Raúl Castro Ruz, akceptis hodia? la ?eneralan sekretarion de la Komunista Partio kaj prezidenton de Vjetnamio, To Lam, kiu kompletigas ?tatan viziton al la insulo.

La? noto publikigita en ?i tiu ?efurbo, amba? partioj aludis al la historiaj ligoj de amikeco kaj la bonega stato de la rilatoj inter niaj popoloj, partioj kaj registaroj, ratifante la komunan volon plifortigi ilin.

En la dialogo, Raúl Castro emfazis la gravecon de efektiva partopreno de Vjetnamio en la Nacia Ekonomia kaj Socia Disvolva Plano de Kubo ?is 2030.

?e la vjetnama flanko anka?  ?eestis la kunvenon membro de la Politika Buroo kaj unua vic?efministro Nguyen Hoa Binh; la membro de la Sekretariejo de la Centra Komitato de la Komunista Partio, estro de la Komisiono pri Eksterlandaj Rilatoj, Le Hoai Trung; kaj la vic?efministro kaj ministro pri eksteraj aferoj, Le Hoai Trung.

Siaflanke, Kubo estis reprezentita fare de la membroj de la Politika Buroo, Ministro de la FAR, Generalo de la Armeo-Korpuso, Álvaro López Miera, kaj la Ministro de Interno, Generalo de Divizio Lázaro Alberto Álvarez Casas, same kiel la funkcianta  Ministro de Eksterlandaj Rilatoj, Gerardo Peñalver.

Fonto: Granma

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/366193-raul-akceptis-la-prezidenton-de-vjetnamio-to-lam

**Radio Habana Cuba**